

voko el stirio

Bulteno de la Esperanto-movando en
Stirio kaj de la Esperanto-Societo
"Unueco" Graz



Mitteilungsblatt der Esperanto-
Bewegung der Steiermark und des
Esperanto-Vereins "Einigkeit" Graz

N-ro 379

decembro / Dezember 2024

ZVR 473841603



Grazanoj en Prago

Frue matene je la 6-a de septembro, ni prenis la trajnon el Graz al Prago. Nia celo estis vizito de ĉeĥa klubo E-mental' post ĝia vizito en Graz marte. La trajno bezonis proksime sep horojn por la vojaĝo kaj ni dormis, manĝis, legis, kaj babilis dum la vojaĝo. Mi ĝojis babili kun usonanaj pensiuloj en la apudaj sidlokoj kiuj vizitis eŭropajn urbojn dum du semajnoj. Ili demandis, "kial bestoj (por viand-produktado) estas neniam videblaj apud la trajnfervojo?" Mi ne havis respondon pri ĉi tiu malsameco inter Eŭropo kaj Oregon en Usono.

Hazarde ni komunikis la malĝustan alvenan tempon al Ementaluloj kaj sole iris al la urbcentro. Ni ŝanĝis monon, tagmanĝis kaj trinkis malvarman ĉeĥan bieron. Sate ni revenis al ĉefstacidomo kaj renkontis la Ementalulojn. Ili tre ĉarme kantis "Bonvenon" kaj ofertis vinon. Ili gvidis nin al la klubejo ĉe la granda strato Revoluční. Post vespermanĝo, klubano Josef prelegis pri historio de judaj setlejoj en Prago. Mi ĉeestis unuafoje en Prago kaj lernis multe pri la centraj partoj de la ĉeĥa ĉefurbo. Poste la klubestrino Vlasta parolis pri la 25-jara evoluo de

la klubo. Oni devus mencii ke alia klubo en Prago ekzistas ekde la jaro 1902. La estro Tomáš ankaŭ partoprenis kaj klarigis ke lia klubo havas alian fokuson. E-mental' certe havas diversajn amuzajn elementojn, ekz. la klubestrino ricevis la titolon "diktatorino". Pere de prelegoj, mi lernis pri la klubstrukturoj. Klubano Martin ludis per du flutoj irlandaj kaj ĉeĥajn kantojn. Finfine ni babilis ĝis la malfrua nokto kaj klubanoj gastigis la kvin grazajn esperantistojn.

Je la 7-a ni promenis tra la urbo kaj la ĉeĥa klubo estis gastema kaj ofertis kafon kaj kukon. Unue ni vidis antikvan urban pordon 'prašná brána'. Bedaŭrinde oni kovris la pordon nun pro restaŭrado. Poste ni vidis la ĉefan placon je matena tempo malplena de homoj. Hazarde granda grupo de profesiistoj filmis ekstere de restoracio kaj ni observis la okazaĵon. Ni transiris la faman ponton de Karlo kaj vidis diversajn monumentojn ambaŭflanke sur la ponto. Sendube la urbo kaj la rivero 'Vltava' estas belegaj matene. Dufoje la Universala Kongreso de Esperanto okazis en Prago, precize je la jaroj 1921 kaj 1996. Pro la dua okazo, Prago konstruis ŝtonan monumenton en la

parko apud la urba kongresejo. Ni fotis nian grupon kaj studis la apudajn monumentojn. Nia sekvanta loko estis la fama historia fortikaĵo 'Vyšehrad' konstruita je la 10-a jarcento. Antaŭ la monumento de 'Ctirad kaj Šárka', ni aŭskultis la bohemian mitologian legendon pri la fraŭlina milito ('Dívčí válka') - dankon al Stanislava por la rakonto! En la najbareco ankaŭ estas la tri diablaj kolonoj kaj la baziliko de sanktaj Petra kaj Pavla. Mi tre ĝojis ke la klubanoj unu post la alia rakontis pri vidindaĵoj. Poste ni tagmanĝis ĉe la restoracio „V Podskalí“. Estas mojosa klopodo de la klubo ke ili tradukis la menuon de tri restoracioj al Esperanto. Do la esperan-tistoj de Graz ricevis esperantan menuon.

Posttagmeze ni denove iris al la ĉefa placo. La plej fama vidindaĵo de Prago estas la astronomia horloĝo 'Pražský orloj' uzata ekde la jaro 1410. Fakte estas la plej malnova uzita horloĝo de la mondo. Ni ankaŭ vizitis vidindaĵon apud la ĉefa placo, la preĝejo de Virgulino Maria antaŭ Týn. Vespere ni iris al restoracio 'U Skřetů' por manĝi kaj poste ludis bowlingon. Certe klubano Petr estis la venkisto kaj atingis pli ol 150 punktojn po ludo.

En la lasta tago, ni vizitis la parkon de 'Maxe van der Stoela' sed nia ĉefa celo estis la distrikto 'Hradčany' kun la katedralo de sankta Vitus. Ni observis la gardistojn dum skipŝanĝo kaj nur estis malgranda grupo el turistoj dum ĉi tiu dimanĉo. La katedralo montras tre detalajn mozaikajn bildojn kaj havas belegan brunan koloron. La malsupra parto estas pli hela ol la supra parto pro lastatempa restaŭrado. Ĉar la distrikto estas je alta parto de Prago, ni trovis bonan vidpunkton por foti. Ni finis nian kunan promenon tra Prago en la restoracio 'Na Hradčanské' (denove kun esperanta menuo).

Posttagmeze ni forveturis trajne al Graz. Mi tre ĝojis pro la afablaj konversacioj, la kunaj promenoj kaj la urbo matene. Koran dankon por ĉi tiu sperto al E-mental!! **Luko Prokop**

¹ <https://www.e-mental.cz/archiv/17410>



Societema kunestado en la klubejo de la pli juna Praga E-klubo „E-mental“, ankaŭ Tomas Brichacek, la gvidanto de la plej malnova jam 1902 fondita Praga E-klubo partoprenis. Maldekstre antaŭe la Espe-ranto-aŭtoro Petr Ĉrdle.

Kiel en Vieno, ekzistas pli ol unu Esperanto-asocio en Praha: la plej mal-nova fondiĝis en 1902 kaj venigis la Universalan Kongreson de Esperanto al Praha dufoje - en 1921 kaj 1996 - kiel ĝia prezidanto, Tomas Brichacek, raportis. Tiu ankaŭ varme bonvenigis la gastojn el Graz al Praha. Laŭ Tomas, la celoj de la du kluboj tre malsamas.

Do por la Graz-grupo estis ne nur tre informa sed ankaŭ tre interesa semajnfino kun sennombraj, neforgeseblaj impresoj de unu el la nekontesteblaj plej belaj ĉefurboj en Eŭropo kun bonega – eŭropa – historio!

Mag. Herbert Kampl

Zamenhoffesto


en **Vieno**

La 14-an de **Decembro 2024** okazos la Zamenhoffesto en la Pola instituto am Gestade 7 en la 10-a distrikto. Sabate ni trafas nin punktuale je la 10,30 horo ĉe nia klubejo kaj ni forlasas Graz per du aŭtoj (7-sidlokan kaj 5-sidlokan) an la direkto al Vieno. Nia unua renkontiĝo estos je la 13,30 horo ĉe la Zamenhofa Monumento Karlsplatz. De tie ni ĉiuj promenas al la Pola instituto. Tie la akcepto okazos je la 15-a horo kaj daŭras ĝis 18-a vespere.

Ni ĝojas pri via partopreno aŭ persone aŭ **interrete** en Zoom pere de <http://bit.ly/ZoomZamVieno>.

Klubvesperoj

en la **Volkshaus** Lagergasse 98a



La planitaj tagoj de niaj klubvesperoj en la kultur.raum graz estas la unua **lundo** de la monato je la **19-a** horo:

2-a de decembro 2024 Philipp Prettenthaler gvidas la klubkunsidon, ĉar Ewald pasigas dek unu tagoj en Britio. Ni volas diskuti, kion estas necesa fari por nia Aŭstria Kongreso (bv. noti la verdan grafikaĵon sur la dekstra flanko!)

13-a de januaro 2025 Ewald denove transprenas lian taskon kiel estro.

Sabate **18-a de januaro 2025** okazos la **Ĝenerala kunveno** de la **AEF** je la 14 horo en nia klubejo.

Pliaj klubvesperoj **3-a de februaro**

kaj **3-a de marto**.

Ĉiufojaj memorigoj sekvas. Ni ĝojas, ke vi povas trovi la tempon por via partopreno.



en la verda koro de Eŭropo –
la kultururbo **Graz**

9-a ĝis 11-a de majo 2025

> AEK2025.esperanto-graz.at



Citaĵo de la tago

„*Mi malakceptas aprobi, ke ekzistas malebloj.*“

Henry Ford. Li inventis la muntoĉenon kaj faris la aŭtomobilon kiel amasvaro.

Zamenhof montras al ni "La Vojon"



Jam aperis 17 porcioj de la ekzercaro "*Aŭskultu kaj ripetu*". Kaj ankoraŭ sekvas kelkaj porcioj. Mi aperigis tiujn ekzercojn sen doni iujn klarigojn, sed kune kun la unua porcio mi enkuŝigis jutuban filmeton kun registraĵo de la Zamenhofa poemo "**La Vojo**".

"Tra densa mallumo briletas la celo al kiu kuraĝe ni iras ..."

Tiu versa piedo (aŭ takto) "*darám da, darám da*" nomiĝas en la greka "*amphybrachys*" (aŭ esperante: amfibrakto). Ĝi taŭgas ege bone por Esperanto, ĉar en Esperanto estas multaj trisilabaj vortoj kiuj havas la akcenton ĝuste sur la dua silabo. Kaj se oni metas dusilaban vorton post unusilaba, tiam same la akcento kuŝas sur la dua silabo, do ekzemple en la frazo "Mi bone komprenas".

Tial estas sufiĉe facile formi frazojn laŭ tiu modelo. Por mia ekzercaro ĉiu frazolinio konsistas el kvarfoje tri silaboj, do "*darám da, darám da, darám da, darám da*". Helpe de truko eblas ankaŭ havi kvarsilabajn vortojn en la frazoj.

Vi nun eble demandas: "Kio estas la aparta utilo de ekzercoj laŭ tiu modelo?" Nu, frazoj kiuj obeas regulan takton, estas pli facile kapteblaj kaj paroleblaj. Ili pli facile eniras en la memoron, eĉ se oni ankoraŭ ne tute komprenas ilin. Do per tia regula takto eblas lerni frazojn dum mallonga tempo. Eblas facile parkerigi tiujn frazojn. Oni povas agrable ekzerci la frazojn sen multe da pensado. Tio ĝojigas. Iom post iom per la ripetado fiksiĝos pli kaj pli da frazoj en via memoro. Kio antaŭe estis fremda aŭ eble stranga al vi, tio fariĝos konata, normala. Kaj vi povas ekzerci en grupo, kvazaŭ en ĥoro, eĉ kun melodio: Vi aŭdas frazojn de iu sperta persono aŭ la registraĵon el la laŭtparolilo, kaj ĉiuj kune en la grupo ripetas je egala rapideco laŭ la sama takto. Tio sinkronizas

la sentojn de la grupanoj kaj kreskigas la grupan senton.

Rilate al la gramatiko de la lingvo, ekzemple la ekzercado de frazoj kun la akuzativa finaĵo ege helpas al tiuj kiuj en sia lingvo ne havas akuzativan finaĵon.

Kaj post multe da ekzercado per sufiĉe multe da frazoj (Mi disponigas en la ekzercaro pli ol 1200 frazoliniojn), vi eĉ povos mem verki novajn ekzercajn frazojn laŭ tiu modelo. Vi ja povos varii frazojn, do anstataŭi vortojn per aliaj vortoj. Tiam vi povos iom post iom fariĝi kreiva en la lingvo. Via memvalorsento kreskos. Vi povos esti fiera ke vi tiel bone regas la lingvon.

La majstro Zamenhof montris al vi "La Vojon" tien.

Tiu-ĉi sonartikolo estis skribita de

Mag. Anton Oberndorfer en *Esperanta retradio*:
<http://aldone.de/retradio>

Ĉu artefarita intelekto forigos la lernadon de lingvoj?



La hispana versio de la retejo “The Conversation” publikigis antaŭ ne longe interesan artikolon de Profesoro Pascual Pérez-Paredes, el la Universitato de Murcia. Temas pri la ebleco, foje menciata en amaskomunikiloj, ke lernado de lingvoj malaperos pro la efikeco de komunikado per Artefarita Intelekto. Jen afero pri kio Esperantistoj havas apartan intereson.

Ĉio devenas de la konata lerteco kaj rapideco, en kiu AI realigas tradukojn. Per ĝi, du malsamlingvaj homoj povas kontentige interkompreniĝi uzante sian propran denaskan lingvon. Fronte al tiu nova fenomeno, ĉu estas senco en lernado de fremdaj lingvoj? Kian rolon havus de nun tiu klopodo?

Laŭ la profesoro, du eblecoj montriĝas. La unua estas katastrofa, rilate al lingvolernado. Ĝi kondukos al komputila alfabetigo en maniero tute malsama ol la ĝisnuna. Oni atribuas do al teknologio absolutan potencon super la homa konduto kaj la socia organizo. Nur fakuloj bezonos lerni la novan sistemon, en universitata medio. Oni konsideras eĉ la eventualan ekziston de lingvoj el aliaj galaksioj, laŭ iaspeca sciencfikcio, kiu proksimiĝas al fantazio. Ĉio komenciĝis kiam la komputiloj fariĝis efika rimedo por lerni lingvojn, en la 20-a jarcento - kio endanĝerigis la profesion de lingvo-instruistoj.

Alia ebleco estas, anstataŭ la katastrofisma, la integra. Nun oni pensas, ke AI helpas la homojn lerni aliajn lingvojn. En niaj komputiloj, ĝi povas helpi nin skribi kaj elpreni informojn en maniero pli rapida. Pli facile oni povas kapti leksikon en fakaj kampoj, ricevi konsilojn pri pli oportuna uzado de esprimoj kaj gramatikaĵoj, kaj plibonigi niajn tekstojn. Lerni lingvojn sekve ne dependos nur de formalaj lecionoj. Cetere, jam de iom da tempo la neformala lernado de lingvoj estas

senduba sukceso en la tuta mondo. Ni vidu ekzemple la furoran funkciadon de DUOLINGO.

Per AI la legado kaj verkado iom ŝanĝiĝos, probable. Tio signifos defian tempon por la homo, kiu ne rezignas pri pensado kaj maturigado de sia kulturo.

Kvankam AI sendube ŝanĝos la signifon de lingvaj baroj en la mondo, lernado de lingvoj plu estos grava eduka laboro dum la sekvontaj jardekoj - asertas Prof-ro Paredes. Scipovi lingvojn ankoraŭ longe estos grava elemento en la kompetenteco kaj socia diverseco. Ĝi helpas la homan cerbon al pli ampleksa kaj profunda analizkapablo. Ĝi plu estos grava por la homa kugno kaj abstraktokapablo. Tiusence, AI estas valora helpilo.

*Tiun ĉi sonartikolon verkis kaj produktis **Paŭlo S. Viana** el Brazilo*

*en Esperanta retradio.blogspot.com,
<http://aldone.de/retradio>.*

La nokto malaperas



Ekde milionoj da jaroj influis la naturaj lumcikloj la vivon de preskaŭ ĉiuj vivaj estaĵoj sur nia planedo. Antaŭ du jarcentoj ankaŭ homoj devis konformiĝi al la mallumo de la nokto, sed ekde la evoluo de artefarita lumo la tuta vivo ŝanĝiĝis, ne nur por homoj sed ankaŭ por multaj bestoj, birdoj kaj herboj.

Satelitaj bildoj montras ke aparte en Usono kaj Eŭropo ĉiu urbo brilas pro la lumoj de strataj lanternoj, grandaj konstruaĵoj, aŝtubuloj, benzinstacioj ktp. La centro estas kutime la plej hela parto de la urbo kaj tie la lumo estas minimume milfoje pli forta ol la natura nokto. Oni taksas ke du trionoj de la loĝantaro neniam spertas veran malhelecon kaj neniam vidas la multnombrajn stelojn de la nokta ĉielo. Pli kaj pli da vidindaĵoj kaj fasadoj estas lumigitaj ĉiun nokton. En Vieno ekzemple tia lumigado disradias tiom da energio kiel la lumoj de sesdekmil loĝejoj.

Ĉie kie oni konkuras pri nia atento aperas lumreklamoj kaj lumĵetiloj. Multaj spektakloj, ekzemple matĉoj de futbalo, kiuj antaŭe okazis postmatene, nuntempe komenciĝas vespere, kaj kontribuas al la malpurigo de la nokta ĉielo. Superabundo kaj intensego de lumo ĉiun nokton kreas novajn ekologiajn problemojn kaj damaĝon al la sano de homoj kaj bestoj.

Ankaŭ en niaj hejmoj kaj labo-rejoj, amaskomunikiloj kaj elektronikaj maŝinoj estas enŝaltitaj dum la tuta nokto. Tiel la cikloj de tago kaj nokto malaperas. Kutime melatoninon estas elŝutata dum la nokto en la homan korpon. Tiu hormono malaltigas la korpan temperaturon kaj ebligas multajn

riparprocesojn en la ĉeloj. Ĝi nur funkcias en mallumo. Medicinistoj atentigas ke pro manko de mallumo multaj homoj suferas je dormoperturboj aŭ sentas sin la tutan tagon tro dormemaj kaj streĉitaj. Krome ŝajnas ke diversspecaj kancerroj pliiĝas pro tiu manko.

Pro tio oni devas agnoski ke la natura mallumo de la nokto nepras por nia sano, ĉar korpo kaj menso bezonas ĝin por rejuniĝi. Lastatempe en Vieno kiel en multaj urboj la respondeculoj finfine ekkom-prenas ke tiu transformiĝo de la natura vivo kaŭzas grandegajn problemojn kaj kostojn.

Tamen estas malfacila tasko konvinki homojn pri la graveco de la problemoj. Kiel eminenta aŭstra lumesploristo skribas, „Se vi trinkas litron da akvo, tio estas bona, sed se vi klopodas trinki mil litrojn, vi havos problemojn, ĉu ne? Kaj ĉe lumo estas simile!“

*Tiu-ĉi sonartikolo estis skribita de **Sheila Spielhofer** el **Aŭstrio** en *Esperanta retradio*.
<http://aldone.de/retradio>.*

Radio en Aŭstrio centjara



"Halo, halo, ĉi tie Radio Vieno sur ondo 530": Estis nur tiuj ok vortoj, sed ili inaŭguris la 1-an de oktobro de la jaro 1924 novan eraon de komunikado en Aŭstrio. Antaŭ 11.000 geaŭskultantoj la tiama federacia kanceliero Ignaz Seipel proklamis "triumfon de la tekniko" kiu "servu por la ekonomia kaj kultura disvolviĝo de la lando", dum alia politika gravulo pledis por malmultekostaj radio-aparatoj por la edifo de "blinduloj el la Unua Mondmilito".

La teknika miraklo kiu naskiĝis el la sendrata transmitado de Morse-signaloj, de sendrata telefonio, kaj sekve de paroladoj kaj kantado, atingis Aŭstrion el Usono dum malstabila epoko: La Unua Respubliko havis malfirman bazon, en ĝi regis malriĉeco kaj senlaboreco, kaj minacis la Monda Ekonomia Krizo en 1929 kaj la faŝismo ekde 1933/34.

Ĉe la enkonduko de la radio regis ankoraŭ grandegaj antaŭjuĝoj kaj timoj kontraŭ tiu nova rimedo. Nur ekde la jaro 1929 la industrio komencis produkti radio-aparatojn kun laŭtparoliloj. Tiuj aparatoj havis komence tre grandajn dimensiojn. La elsendoj okazis sur mezondoj kaj la teknika kvalito de la transmititaj programoj estis laŭ nia hodiaŭa prijuĝo sufiĉe malforta.

Sed malgraŭ tio oni transmitis ne nur parolajn programojn por kiuj la kvalito estis sufiĉe bona, sed ankaŭ koncertojn aŭ spektaklojn de muzikteatro, ekzemple el la festivalo de Salzburg. Sed la radio fariĝis rapide populara, sed ankaŭ sufiĉe kosta: Unuflanke la radio-aparatoj estis multekostaj, kaj aliflanke la aŭskultantoj jam dekomence devis pagi kotizon por financi la programojn.

Kaj la gazet-eldonistoj vidis en la radio fortan konkuranton, ekzemple rilate al sport-raportoj. Sed la radio akiris pli kaj pli da potenco. Ne estis

hazardo ke la unuaj regulaj radio-elsendoj ekde la 1-a de oktobro 1924 venis el la armea ministerio. La sendrata telefonio dum longa tempo estis afero de la armeo, kaj tiun povon oni nur malvolonte cedis al la mastrumantoj de la radio.

Kelkajn jarojn poste en Germanio okazis radio-elsendoj ankaŭ en Esperanto. Tiu pozitiva evoluo bedaŭrinde ĉesis pro la Monda Ekonomia Krizo kaj la sekva transpreno de la potenco flanke de la naziaj faŝistoj. Post la Dua Mondmilito la aŭstra radio ja denove elsendis semajnan programon en Esperanto, kio tamen finiĝis dum la 1990-aj jaroj, ĉar oni ne plu disponigis buĝeton por tio.

La Esperanta Retradio nun funkcias senfinancaj rimedoj kaj tamen povas aperigi programojn ĉiutage danke al la interreto. La teknikaj cirkonstancoj ŝanĝiĝis favore al Esperanto.

Mag. Anton Oberndorfer en *Esperanta retradio*:
<http://aldone.de/retradio>

Senmorteca humoro



„La malsaĝeco de la homoj mortigis min“ – Kiam tomba enskribaĵoj invitas subrideti. Spurserĉado en la Viena centra tombejo.



Hotelo en Trieste

„Ĉu vi konas la urbon Trieste?“
 „Mi venas tien regule.“
 „Kiun hotelon vi konsilus al mi?“
 „La Majestic.“
 „Ĉu vi tie jam loĝis?“
 „Ne, sed en ĉiuj aliaj.“


Kuracisto kaj sia edzino

Kuracisto disputas kun sia edzino: „Vi estas malbona kuiristino, vi elspezas tro multe da mono kaj vi estas mizera en la lito!“

Kiam li du semajnojn poste venas hejmen, li trafas ŝin kun sia kolego en unusenca pozicio.

„Kio ĉi tie okazas?“ li kriegas.

„Mi havigas duan opinion“, ŝi reciprokas trankvile.



„La malmilda konkurenco devigas la aŭtomobilindustrion ĉiam denove al la konstruado de novaj teknikaj rafinecoj.“

Loriot, naskita kiel Bernhard-Viktor Christoph Karl von Bülow 1923-2011

* Impressum *



Mitteilungsblatt des Grazer Esperanto-Vereines Esperanto-Societo Stirio „UNUECO“

Für den Inhalt verantwortlich:
 Dr. Heinz-Paul Kovacic
 Panoramagasse 3, 8010, Graz
 Tel. 0664 3264027
 heinz-paul.kovacic@aon.at